

Komputi pli ekologie

chu vi scias kiom da energio voras via komputil(et)o ?
Eble en via urbo, la energi-provizanta firmao lu-donas mezurilon,
au vi povas aĉeti ghin (je ch. 10 euroj) kaj uzi kun viaj konatuloj.
Jen nur kelkaj pripensoj kaj konsiloj:
Se vi povas amendi tiun temon per plia au alia konsil(et)o, bonvolu !

Reorganizi malnovan komputilon:

Antau aĉeti novan komputilon, ĉar via malnova malrapidas - ĉu vi jam reorganiz(ig)is vian diskon ?
Unue pere de programo kiel "CCleaner" kaj poste pere de Defraggler - malfragmentilo.
Kompreneble dum la jaroj kolektighas dosieroj, bildoj k.t.p. kiujn vi neniam plu bezonos - forvishu ilin.
Novaj programoj bezonas pli kaj pli grandan memorilon - eble vi ne bezonas ĉiujn novajhojn ?

Aĉeti novan komputilon:

Se vi aĉetas novan, atentu pri tio.
Elstara grafikajho uzas elstare multe da energio.
Tuba ekrano bezonas pli ol plata (LEDa).

Serĉi:

Serĉi per Guglo konsumas pli; prefere unue rigardi kion jam scias Vikipedio,
kie ja ankau trovighas granda parto legeble en Esperanto - vi rajtas kontribui.
Aliflanke Vikipedio petas subten-monon de la uzantoj, dum Guglo "vivas" de la varbajhoj.

Sendi ret-mesaghojn kun alrokrochita dosiero:

Sendi ret-mesaghon al unu au multaj estas facile.
Sed pripensu ĉu vi ghojigos la ricevantojn au chagrenigos ilin eble. Kelkaj pet-leteroj ne indas esti senditaj, ĉar temas pri t.n. "hoax" (senutilajho, malghusta enhavo, troigo).
Prefere ne sendu alrokrochitan tekston, se temas pri simpla mesagho.
Kelkaj shatas la spritajn bildetojn, kiuj pli ofte nun venas por gratuli - mi ne.

Se vi sendas alrokrochitan tekston - bonvolu pripensi ties formaton:
La nun moderne kutima "DOCX", ne estas komprenebla per malnovaj softvaroj; prefere sendu kiel "RTF", "PDF" au almenau "DOC" (versio 1997, 2000).
Modernigu vian "Open Office" au similan programon se vi ne povas legi docx-dosierojn.
Se vi ricevas ret-mesaghon sen enhavo - povas esti ke vi devas shanghi la rigard-manieron "simpla HTML" eble taugos.

Printi pli ekologie

ghenerale maldikaj literoj bezonas malpli da inko au karbono.
Shparemaj litertipoj estas:
Century gothic (shparas 30% relative al Arial)
Calibri, Verdana, Times New Roman.

Ne malshpari paperon kaj inkon - **Ne ĉiu teksto indas esti printita !**

Se la teksto (ret-mesagho) enhavas tro grandajn au dikajn literojn - eble indas redukti la literojn - au kopii, kaj printi el alia tekst-programo (WordPad en kazo de MS).

de: Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) www.verduloj.org/dokument.htm